

NIAJ KONKURSOJ (2020)...

La 12-an de aprilo 1905 fondiĝis pro iniciato de Rudolf Janas la unua organizita grupo de esperantistoj en Vroclavo kaj en Silezio. Baldaŭ Vroclavo – la urbo ĉe kontakto de multaj kulturoj fariĝis tre grava centro de Esperanto-movado. Dinamikan esperantistan aktivecon rompis akiro de regopovo fare de nazianoj kaj eksplodo de la 2-a mondmilito. La hitlera reĝimo punis la homojn pro la Esperanto-agado, sendante ilin al koncentrejoj.

Vroclavaj esperantistoj decidis festi 115-jariĝon de Esperanto en Vroclavo pere de organizado de jenaj e-konkursoj:

- **INTERNACIA E-KONKURSO POR POEMA MINIATURO "ESPERO ESTAS VERDKOLORA" VROCLAVO 2020**
- **INTERGENERACIA KONKURSO DE INTERPRETADO (3-A ELDONO) „NI IRU KUNE PLU!” VROCLAVO 2020**

Celo de la konkursoj estas promocio de humanismaj, esperantaj valoroj, instigo por pripensoj kaj ankaŭ serĉado de lingvaj kaj artistaj talentoj kaj instigo por monstro de propra kreativeco.

Konkurso por **POEMA MINIATURO** estas adresita al plenkreskaj personoj. La konkursa verko devas esti mini-poemo – en laŭvola formo, sed malampleksa- tio estas ĝis 8 linioj de la teksto.

La gvida temo estas la titolo de la konkurso „ESPERO ESTAS VERDKOLORA”. La verkoj devas esti originalaj, nenie publikigitaj, skribitaj en Esperanto aŭ en la pola lingvo.

Pri la temoj ligitaj kun la konkurso por poema miniaturo oni povas komunikiĝi pere de jena retroŝta adreso: **espero.konkurso@gmail.com**.

La **INTERGENERACIA KONKURSO DE INTERPRETADO** estas adresita al personoj en ĉiu aĝo. La konkursa verko devas esti ligita kun la temo de la konkurso „NI IRU KUNE PLU!” kaj ampleksas jenajn prezentadojn:

- Interpretado de bildo (foto, desegnaĵo el la propra arkivo) –en formo de rakonto, evento, ligita kun la bildo (priskribo ĝis 1 paĝo de la formato A4).
aŭ
- Voĉprezentado (recito, kanto, surscenigo) realigita fare de individuaj personoj, paroj /grupoj de personoj (ankaŭ intergeneraciaj). La prezentado- ne pli longa ol 2,5 minutoj – devas esti publikigita en You Tube kaj ligilo al la publikaĵo alsendita al ni –tio estas - al la Organizanto.

La tekstoj kaj la prezentadoj povas esti en unu el du lingvoj: en la pola aŭ en Esperanto.

Pri la temoj ligitaj kun la konkurso por interpretado oni povas komunikiĝi pere de jena retroŝta adreso: **interpreta.konkurso@gmail.com**.

La konkursaj prezentadoj estos pritaksataj fare de konkursa ĵurio.

Por partopreni en elektita konkurso oni devas:

1. Atente tralegi la konkursan regularon.
2. Plenigi kaj subskribi formularon de aliĝilo de elektita konkurso.
3. Plenigi kaj subskribi la deklaron - permesilon por prilaborado de la personaj datumoj kaj publikigo de la konkursa verko (en la konkursa retejo).

Skandildojn aŭ fotojn de plenigitaj kaj subskribitaj dokumentoj oni devas sendi en elektronika formo laŭ la adreso de elektita konkurso. Estas allasebla ankaŭ sendo de subskribitaj dokumentoj en papera formo al adreso de la organizanto: Silezia Esperanto-Asocio ul. Kościuszki, nr 35/B, PL 50-011 Wrocław (decida estas la dato de la poŝta stampo).

La konkursaj laboraĵoj devas esti liveritaj per retroŝto (laŭ la adreso de elektita konkurso)o aŭ en kazo de registritaj prezentadoj devas esti alsenditaj ligiloj al publikigitaj materialoj en You Tube.

Prezizajn informojn, regularojn de la konkursoj, limdatojn kaj kontaktoeblecojn oni povas trovi en la konkursa retejo (jen la retejo en Esperanto): <https://sites.google.com/view/avanaforumo>.

Ni kore invitas al komuna ludo!